






Janet Frame, 1924-2004
 Novzelanda verkisto



Esperanto sub la Suda Kruco

Marto-Aprilo 2004
 Numero 68 (Volumo 12, no.2)



Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Numero 68 (volumo 12, numero 2), Marto-Aprilo 2004

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

Telefono: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝte: sudakruco@sudakruco.org

Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson St, Redfern, NSW 2016, Aŭstralio.

E-poŝte: libroservo@ans.com.au

Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towoomba Road, Oakey Qld 4401, Aŭstralio.

E-poŝte: hazgreen@twmba.net

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: “Ni vere bezonas artikolon pri ...?” Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Ni preferas ke vi sendu vian kontribuon per e-poŝto, al la adreso: sudakruco@sudakruco.org; vi povas ankaŭ sendi ĝin sur Zip-disko (100mb aŭ 250mb), sur komputila disko (Mac aŭ Windows), sur KD, aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondacas nur ĝia aŭtoro.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj

AEA/NZEA Kongreso 2004

Sandor Horvath, Hazel Green.....	3
Franciska Toubale.....	4
“La malfeliĉa mardo kaj la feliĉa bufo”.....	5
“Foriro” (Terry Manley).....	6
Fotoj el la Kongreso.....	7
Feliĉaj memoroj pri miaj fruaj jaroj (Kay Andersen).....	9
Elektro kaj la paranormalo? (Frank Swift).....	12
AEA Estaro 2003.....	14
Sukcesis en ekzamenoj.....	14
Koresponda servo; Historio de Esperanto en Aŭstralio.....	15
Tutmondiĝo kaj lingvo (Santiago Torné).....	16
Nekrologo: Marjorie Ellyard (Jennifer Bishop).....	17
Ĉu gravas do la nomo? (Katarina Morimer).....	18
Recenzo: <i>Mini Dictionary</i> ; Interrete.....	20
Deziras korespondi.....	21
Skribas la legantoj: Jonathan Moyalan, Paul Desailly, David Whitmore.....	22
El la regionoj.....	23
Esperanto-akvoputo en Benino.....	25
Treasurer’s and Auditor’s Reports.....	26

Sur la kovrilo: *Janet Frame*, kiu mortis pro leŭkemio la 29an de januaro 2004, estis eble la plej beletra novzelanda romanisto ĝis nun. Serioza kandidato por la Nobel-Premio, ŝi estis profundanima, kaj eksterordinare modesta, verkisto. En 1991 diskonigis internacie akklamata filmo *Anĝelo ĉe mia tablo*, bazita sur tri el ŝiaj aŭtobiografioj. La mondo lamentas ŝian morton.

LA AEA/NZEA KONGRESO 2004

raportas Sandor Horvath

La ĉi-jara kongreso de AEA Esperanto okazis en Redcliffe, norde de Brisbano (19/1 - 25/1/04). Ne okazis kursaro, do partoprenis malpli da homoj ol dum la kutimaj tradiciaj somerlernejoj.

Jen kelkaj personaj impresoj miaj:

Estas ĉiam granda plezuro rerenkonti la esperantistojn el aliaj ŝtatoj kaj miri pri la (por mi) novaj. Ekzemple: Ivano el Brisbano, kiu insistis ke vi devas, almenaŭ unufoje en via vivo fumi Havano-cigaron.

Finfine mi ankaŭ renkontis alian Sandoron, Hungara kuracisto el Bendigo.

Mi estas tre imponita de la malferma ceremonio. Maroochy Barambah, loka aborigena virino, bonvenigis nin kaj poste la urbestro de Redcliffe, Alan Boulton, parolis al ni, speciale bonvenigante la grupon de 5 japanoj el la ĝemela urbo Onoda.

Tiuj 4 junaj japanoj kun sia instruistino vere aldonis multe da koloro al la kongreso. Kiu pensus ke du el ili povus ekciti nin per Flamenko-danco!

Terry Manley zorgis pri nia sano, gvidante kurson de Taj Ĉi ĉiumatene, la manĝaĵoj estis tre allogaj, bonaspektaj kaj bongustaj, kaj la juna Jonathan estis fonto de senĉesa energio.

Mi redecidis aŭskulti 3ZZZ-on pli ofte per la reto (www.3zzz.com.au). La teamo tie vere meritas nian subtenon.

La duŝoj bone funkciis, la kantado aŭdiĝis ĉiun nokton kaj Daniel Kane respondis al (preskaŭ) ĉiu demando pri la U.K. en Ĉinio.

La AEA-membraro vigle diskutis pri aliaj modeloj de somerkursaro. Kombini ĝin kun (mond)festivalo? Ankoraŭ ne. Eble poste.

Mi ĝojis eltrovi de Steve Pitney ke Rotario havas kelkajn esperantistojn kaj ke ni havis ĝiĉeton ĉe la lasta internacia kunveno de Rotario en Brisbano.

Viktorio gajnis la tradician teatran premion. Mi estis unu el la juĝistoj. Nefacila afero. Tamen, Marcel remarkis ke "finfine la juĝistoj estis honestaj".

La intervjuo kun la nobelpremiito profesoro Reinhard Selten, prezentita de Rainer Kurtz estas ege taŭga por montri al aliaj esperantistoj ke nia lingvo eĉ taŭgas por sciencaj agadoj. Estis speciale interese aŭdi kiel Reinhard kun helpantoj produktis tiun filmon.

Specialan gratulon al la tri sorĉistinoj kaj la aliaj Kvinslandanoj pro la bonega organizado. Tio certe kuraĝiĝis min kontribui al interesa somerkursaro en Adelajdo en Januaro 2005. □

Komentas Hazel Green

Mi miris pri la talentaj Esperantistoj el Aŭstralio kaj Novzelando, kiuj distris, klerigis, kaj eĉ plisanigis nin dum nia kunkongreso en januaro. Sed ankaŭ aliaj landoj bone kontribuis.

Rainer Kurtz el Germanujo prezentis la filmbendon kiun li faris per

intervjuo kun Profesoro Reinhard Selten, nobelpremiito kies fako estas ludteorio. La filmo bone ilustras la taŭgecon de Esperanto por sciencaj aferoj. Rainer esperas ke, per alilingvaj subtitoloj, ankaŭ neesperantistoj povos rigardi la filmon. Helpos intereson, la fakto ke John Nash, fama pro la filmo *A Beautiful Mind*, ricevis sian premion kun Profesoro Selten. Post klarigo de Rainer, ni povis eĉ senti ke ni almenaŭ parte komprenas ludteorion.

Kaj el Japanujo venis informo prezentita de OSHITA Megumi, SORATA Ayaka, WADA Rie, kaj YAMASHITA Tomoko, post enkonduko de ilia instruistino IKEDA Tomiko. Kvankam Megumi, Rie, Tomoko kaj Ayaka jam lernis Esperanton dum nur kelkaj monatoj, ili povis distri nin per belaj bildoj kaj bonaj esperantaj vortoj. Tomiko bone instruis ilin.

Ĉiu el la 4 studentinoj loĝas en aŭ sufiĉe proksime al Onoda, ĝemelurbo de Redcliffe, kaj faris sian duan viziton al la aŭstralia ĝemelurbo, ree loĝante kun la samaj gastfamilioj. Ili parolis al ni pri siaj gubernio, urboj, vidindaĵoj, kolegioj, kimonoj. Ni vidis bildojn de diversaj robotoj, amuzaj aŭ utilaj, evoluigitaj de studentoj en la nacia kolegio de teknologio; ni vidis la manieron kolekti tapojn, speco de konkulo manĝata en Onoda; ni aŭdis ke la gubernio Yamaguchi estis tre grava por eksterlanda komerco en malnova tempo.

Post la paroloj, Tomoko kaj Ajaka ravis nin per prezento de tri flamenkaj dancoj. □

Pripensas Franciska Toubale

La bonvenigo sur la tero de Redcliffe de Maroochy Barambah al la kongresanoj, laŭ la aborigena tradicio, kreis apartan etoson ekde la komenco. Koran dankon al la kvinslandanoj kiuj organizis tre riĉan kongreson en sia ŝtato, de la 19a ĝis la 25a de januaro.

Kvindeko da homoj ĉeestis la tutan eventon, inkluzive de nun kutima vizitanto el Germanujo, Rainer Kurtz, kaj el Onoda, la ĝemelurbo de Redcliffe, kvin japaninoj, kiuj kreis internacian etoson. Deko da homoj ĉeestis parton de la kongreso. Menciindas la ĉeesto de juna novbakita esperantisto, Brian Balhachet, kiu komencis lerni la lingvon per la Reto antaŭ monato kaj intencas krei klubon en sia gimnazio, ĝuste en Redcliffe. Ni esperu ke li estos tiom sukcesa kiom Jonathan Moylan en Novkastelo.

Ĉijare la tagprogramo komenciĝis tre frue. Jam je la 6.30 matene Terry Manley gvidis sesion pri Taj Ĉi Ĉuan, kiu allogis sufiĉe multe da homoj.

Kvankam ne estis kursoj, aliaj kuraĝuloj sukcese trapasis ekzamenojn kun Marcel Leereveld.

Dum la cetero de la tago okazis prelegoj. Daniel Kane donis kelkajn konsilojn al la partoprenantoj de la Universala Kongreso en Pekino. Terry Manley informis pri sia projekto daŭrigi la laboron de Ray Ross pri la historio de la Esperanto-movado en Aŭstralio kaj bonvenigas ĉiun informon pri la klubaj aŭ regionaj agadoj. Ne forgesu ke 2005 estos la jaro de la centjariĝo de Esperanto en Aŭstralio. Steve Pitney prezentis la Rotario-asocion, ĝiajn historion kaj celojn. Marcel Leereveld atentigis pri la danĝero ne uzi sian rajton decidi kio estas ĝusta Esperanto laŭ la *Fundamento*. La merkredan posttagmezon la novzelandanoj prezentis amuzajn skeĉojn kaj seriozajn erojn, kiaj la prelego de

Erin McGifford pri Bickerton, fama sciencisto kaj esperantisto el Christchurch; tiu de Dave Dewar pri la komunikado per korpo; tiu de Frank Swift pri elektro kaj paranormalaj fenomenoj; tiu de Howard Gravatt pri la nomo Gravatt; kaj tiu de Brian Fox pri la vulkanoj en Aŭklando.

La kongresanoj havis la eblon esti ankoraŭ pli aktivaj kadre de la sesioj titolitaj “Uzi Esperanton teatrume”, la ludoj prezentitaj de Sandor Horvath, la dancoj, la kantado, kaj la kvizo kies rezulto pozitive surprizis la kvizestron Bernie Heinze.

Kiel kutime la ŝtatoj konkursis per kantoj kaj per teatrumado. Malgraŭ la vigleco de la makbetaj sorĉistinoj el Kvinlando kaj la vivĝojo de la novsudkimrujanoj en “Seksperanto”, la juĝistoj atribuis la Herbert Koppel-trofeon al Viktorio por la komedio (ne rekomendita al infanoj) verkita de Mary Lenarduzzi kaj tradukita de Franciska Toubale: “Pli ol ludo”.

Kompreneble la plej granda parto de la tempo estis dediĉita al la ĝenerala kunveno de Aŭstralia Esperanto Asocio en unu ĉambro kaj Novzelanda Esperanto Asocio en apuda ĉambro. Tamen ekskursoj ebligis la kongresanojn pasigi kelkajn horojn en Brisbano kaj konatiĝi kun la urbo Redcliffe laŭ la rekomendo de ĝia urbestro Alan Boulton, kiu ankaŭ bonvenigis la esperantistojn. Strato “Esperanto” apud la kongresejo sugestas ke pasintec Redcliffe enhavis pli da esperantistoj ol nun. Sed ŝajnas ke neniu memoras tiun tempon.

La adiaŭo ne estis malgaja ĉar ĉiu havas en la koro la esperon renkontiĝi ree en Adelajdo venontjare... □

LA MALFELIĈA MARDO KAJ LA FELIĈA BUFO

[Ĉi tio temas pri teatraĵeto komune kreita dum la kongreso. Necesas klarigi: la ideo estas krei anekdoton kaj tuj prezenti ĝin teatrume. Unue unu el la ĉeestantoj hazarde prenas karton el proponita aro, sur kiu estas nomoj de eblaj ĉefroluloj. En ĉi tiu kazo estis elektita forĝisto. La gvidanto demandas kiom aĝa estas la forĝisto, kie li estas, kial, ktp., dum iu skribas la detalojn. Post duonhoru la skribinto legas la informojn kreitajn de la ĉeestantaro, la diversaj roloj estas disdonitaj kaj teatraĵeto estas prezentata. Poste ĉiu sidas en rondo por plia duonhora demandaro. La rezulto estas ankaŭ tuj prezentata kiel teatraĵeto. — F.T.]

Je la 6a matene aŭ la 6a vespere, neniu precize scias, la 30an de novembro 1876, kiu estas ankaŭ la unua mardo de novembro ĉar la urbestro ĵus kreis tiun novan tagon de la semajno, je tiu momento de la jaro kiam la printempo ankoraŭ ne tute foriris kaj la somero apenaŭ komenciĝas, John Smith, dudekdujara forĝisto, kiu pro pena laboro kaj malfacila vivo aspektis tridek sep, estis en la drinkejo apud la ormino, drinkante meze de svarmo da muŝoj “Johnny-Walker”-bieron, tiun bieron, kiun la lokaj ministoj konsideris sia viskio.

Tiam anoncis John Smith ke per la granda kvanto da mono gajnita per vetado okaze de ĉevalkonkurso, li aĉetis la drinkejon per la sumo dek pundoj. Dek pundoj estis malgranda sumo eĉ en 1876, ĉar ne plu restis oro en la mino kaj baldaŭ la ministoj forlasos la urbon. Anoncante tion John Smith estis ploranta pro la foriro de sia edzino. Ŝi estis postkuranta la vorton “ne”, kiu estis forpelita el la domo. John enprofundigis la najlojn de la ŝuoj de la ses ĉevaloj

ĝis la ostoj kun la celo reteni sian edzinon. Sed la ĉevaloj mordis lin. Sekve li perdis kaj la dekstran kruron kaj la maldekstran brakon.

“Kion fari je John Smith en tiu stato?” pensis la orministoj “Ĉu mortigi lin?”

“Kial ne fari kolbason el lia kadavro kaj el tiuj de la ĉevaloj?” proponis unu orministo. Fakte ankaŭ la ĉevaloj estis en tre malbona stato pro infekto en la sango kaŭzita de la najloj kaj pro drinkado de tiu “Johnny-Walker”-biero. Certe la edzino de John celis lin murdigi. Sed ekkonsciante pri ŝia fiago, la muŝoj sekvis la vespertojn, kiuj kondukis ilin al la arbaro, kie loĝis Marooĉi, indiĝena magiistino, kiu havis la kapablon malaperigi homojn kaj kuraci per branĉo de akacio. Marooĉi tuj venis al la drinkejo por resanigi Johnon. Ŝi flustris en lian orelon:

“Mi estas dudekdujaraĝa fraŭlino, sen edzo, sen mono. Mi povas kuraci kaj malaperigi homojn. Mi kuracos vin kondiĉe ke vi edziĝos al mi.”

John konsentis kaj ambaŭ iris en la arbaron al la fonto kies akvo reunigas la homojn, por la edziĝceremonio. Sed pro la mensogo de Marooĉi, kiu fakte aĝis okdek sep jarojn, ambaŭ dronis. La edzino de John, provizore malaperigita, reaperis kiel bufo. La bufo tuj komencis manĝi la abundajn muŝojn kaj la urbestro tuj nuligis la ĵus kreitan mardon. □

“Foriro” de Terry Manley

Rideganta babilado ĉirkaŭe de mi kontente feliĉigis min. Post bona manĝo de rostfestoj mi spertas plensatiĝon kaj post bona kongreso mi sentas plenan kontentiĝon. En apuda ĝardeno Kam Lee fotografas gejunulojn: Megumi, Ayaka, Rie kaj Tomoko el Japanujo, Rainer el Germanujo, Benita el Novzelando, Jonathan kaj Brian. Iomete fone aŭdiĝis la nemistrafeblaj notoj de la sakŝalmo de Roger Springer. La ĉielo koloriĝis je rozaj nuboj iĝantaj pli ruĝaj kaj vastaj. Arko de Luno kaj Venuso volviĝis en tiu travidebla vualo. Kiel papilioj al floroj Esperantistoj svarmis por spekti kaj aŭskulti tiun neforgeseblan scenon.

Sur la ŝultro de Franciska, japanino ploretis. La emocio de sorĉa momento kaj la bezono foriri al aviadilhaveno tiel trafis ŝin. La aliaj japanoj rondiris, dirante “ĝis” al ĉiuj. Poste estis mia vico. Emocio ne tiel trafis min, ĉar multaj diris “ĝis venonta jaro”. Sed por la japanoj, kiuj scias kiam ni ree renkontiĝos?

En vagono al la urbocentro mi sidis inter junuloj kiuj iris por ĝui brumuzikon en la urbo. Aŭskultante ilian konversacion mi sentis ke la intereso de tiuj ne estas la miaj. La emon riski kaj kompari. Ili parolis pri aŭtoj rapidaj, motorbicikloj grimpopovaj, markoj de porteblaj telefonoj kaj kia modo taŭgas por la hararo. Mi sentis kiel fremdulo inter alikulturanoj. Ĉu spuro de aĝo? Aŭ ĉu malintereso pri ŝajne negravaj aĝoj? Sed ankaŭ temas pri lingvo. Mi dum semajno parolis preskaŭ nur Esperanton, kaj ĉi tiuj fremdaj lingvoj kaj kulturo sentigis min izolita.

Survoje fulmotondris kaj fine pluvegis. La junuloj parolis pri renkontiĝo kun aliaj en la urbocentro kaj malakurateco. Sed ne gravis en ĉi tiu epoko de porteblaj telefonoj. Ili aŭ telefonis aŭ ricevis alvokojn plurfoje dum la hora vojaĝo.

Voĉo anoncis ke paneis la signalsistemo kaj ni devas atendi. Vizaĝoj mon-

tris sendeziran cedon al tiu sorto. Salte halte iom post iom daŭris la veturo ĝis la centra stacio, kie ĉiuj devis eltrajniĝi. Mia bileto estis ĝis Strato Roma, sed post enketo ĉe deĵoranto mi decidis piediri. Ekstere pluvetis. Bonŝance. Se mi estus elirinta la vagonon antaŭ duonhoro je la akurata atingotempo, mi estus tute malseka post momenteto pro la pluvego.

Transirante la malsekajn stratojn mi sentis min kiel kamparanon. La aŭtoj ŝajne senzorge veturis en tiuj kondiĉoj. Kvankam iom dormema, mi ĝuis la marŝadon al la junulgastejo.

Anglino parolis kun la gastestro kaj malfacile regis sian emocijon. Iu forŝtelis la dorsosakon survoje kaj nun ŝi nur havis la vestojn en kiuj ŝi staras. Apudulino brakumis kaj konsilis ŝin. La estro diris ke li helpos pri nuligo de kreditkartoj kaj regajno de havendaj dokumentoj. Envenis aliaj junulinoj kaj ĉiuj ĝoje kriis pro hazarda rerenkontiĝo. Almenaŭ la anglino ricevis kompaton kaj subtenon de siaj kunvojaĝantoj.

Postnelonge mi aranĝis pri lito kaj dormis. Mia korpohorloĝo ankoraŭ ne alkitimiĝis al la horo da diferenco en Kvinslando. Mi vekigiĝis je la kvina kvinslande, do ne timis pri mistrafo al buso. Post duŝo en la mateno, mi sciis ke restas pli ol horo ĝis la foriro de la buso, do mi sidis sur la lito kaj meditis. Malfermante la okulojn mia samĉambrano geste salutis min. Li envenis dum la nokto kaj mi eksciis pri tio per sonora ronkado. Mi emas profunde dormi dumnokte, kaj li emis nur ronki surdorse, do ne tre ĝenis min. (Mi ĝojas diri ke miaj samĉambranoj ĉe la kongreso ne ronkis.) Post la saluto mi demandis: Ĉu li kaptiĝis en la pluvo hieraŭ? Lia respondo: "Mi estas franco. Mi ne parolas la anglan." Nu, mia T-ĉemizo estis tiu fabrikitita de Tom O'Grady kun ESPERANTO majuskule skribita sur ĝi. La franco certe vidis ĝin sed kion diri al li? Mi diris ke mi parolas nur du lingvojn: la anglan kaj Esperanton. Elirante mi klare diris "Bonan vojaĝon. Ĝis la." Ĉu li pensis ke mi fuŝparolis la francan, mi ne scias, sed mi esperas ke ne.

Marŝante al la centra bushaltejo, mi cerbumadis. Kiom da vizitantoj ne havas regon de la angla kaj kiomfoje tio kaŭzas problemojn? Ĉu iu jam esploris pri tio? Kiel fari demandaron al gastejaj organizoj, veturorganizoj pri tio?

Ĉe la busejo mi ree sentis min kiel fremdulon en mia lando. Germana paro luktis kun valizoj strebante enpaki tiujn en ŝlosorankon. Ili fine cedis al la formularo ke la volumo de la valizoj pli grandis ol la volumo de la ŝranko. Kiel mi sciis ke ili estis germanoj? eble ili ne estis. Sed por havigi al si ŝlosilon por la ŝranko oni petas al maŝino. La maŝino havas ses lingvojn plus la angla. La germanan, francan, japanan, ĉinan, hispanan kaj korean. La paro elektis la germanan. Apude parolis grupo de japanoj. Voĉo anoncis baldaŭan foriron de mia buso. Mi rimarkis ke la voĉo ne estas sama kiel tiu en la maŝino. La maŝina lingvo estas tre baza. Ellasis nenecesajn vortojn. Tiu de la anonco ne estis tia. Mi penis kapti la vortojn kaj kompreni. Ĉu alilandanoj havas ian ajn ŝancon kompreni? Ĉe la ĝiĉeto aziaspekta viro klopodis kompreni la deĵoranton. Eble ruze, ĉar la aziulo provis porti pli da pakaĵoj ol akcepteblas.

Mia menso vagis al antaŭa tempo kiam mi vojaĝis en Aŭstralio kaj simile en gastejoj renkontis alilingvulojn. Je tiu tempo mi renkontis Marie Mueller-on kiu komencis instrui Esperanton al mi, kaj danke al ŝi kaj Esperanto mi pleningis grandan mankosenton en mia animo. □

FOTOJ EL LA KONGRESO



Japaninoj



Urbestro Alan Boulton



Teatraĵo Bernie Franciska



Teatraĵo Kun Franciska



Sorĉistinoj



Taj Ĉi Kun Terry



Sandor kaj Sandor



SAT-kunveno



Ludo: Giganto-Etulo-Feino

La fotojn disponigis Sandor Horvath

FELIĈAJ MEMOROJ PRI MIAJ FRUAJ JAROJ

de Kay Andersen

Mi naskiĝis en Charters Towers. Ĉu vi scias kie troviĝas tiu urbo? Unue, serĉu la marbordon de Kvinlando (Queensland) ĝis kiam vi trovos la urbon Townsville, tiam sekvu la vojon sudokcidenten kaj tie vi trovos "La Mondon", kiu estis kromnomo por Charters Towers dum ĝiaj fruaj tagoj.

Post kiam oro estis trovita en tiu regiono en 1871, orĉasistoj rapide alvenis kaj tial kreskis la urbo ĝis 32 000 enloĝantoj. Kiam mi naskiĝis (mi ne intencas riveli la jaron!), la urbo ne longe estis fama, la orminoj estis fermitaj, kaj la enloĝantoj nombris nur 6 000.

Familio:

Eĉ kvankam mi naskiĝis en Charters Towers (kompreneble, mia patrino ankaŭ estis tie) tamen, la familio estis loĝanta en Cairns. Kiel kutime je tiu tempo, la estonta "panjo" preferis resti kun sia patrino por la akuŝo. La gepatroj de mia patrino troviĝis ĉe Charters Towers, do en tiu direkto vojaĝis panjo. Ŝajnis ke avino havis tre necesan rolon en la serioza dramo de la nasko. Sendube, avoj kaj patroj ne estis bonvenaj en tia dramo. Kelkajn semajnojn post mia alveno, patrino kaj mi trajne reiris al la familio en Cairns kie la nova bebo renkontis siajn patron, fratinon (6 jaraĝan) kaj fraton (8 jaraĝan). Mi ne memoras ion pri Cairns, ĉar, post kiam mi atingis la aĝon de du jaroj, la familio translokiĝis de Cairns al Charters Towers, kio plaĉis al mia patrino.




Mi kun du kuzinoj en la rivero kie ni kaptadis ranidojn. Mi estas maldekstre.

Geavoj:

Avo kaj avino loĝis en malgranda domo, sed ĉirkaŭ ĝi estis granda parcelo, interesa loko kie genepoj povus pasigi multajn horojn grimpante la arbojn; kaj

apud la parcelo estis rivereto kie ni kaptis ranidojn kaj fiŝetojn.

Ĉiun dimanĉon, posttagmeze, mia patrino insistis (mi opinias ke ja avino insistis, kaj panjo obeis), ke mi ĉeestu la biblian klason ĉe la Metodista Preĝejo kiu situis sufiĉe proksime al la domo de la geavoj. Dum panjo kaj avino babiladis mi devis sidi en varmega preĝejo, en miaj plej bonaj robo, ĉapelo kaj ŝuoj, ŝvitkovrite. Anstataŭ atenti la biblian lecionon, mi revis pri la malvarma lakto kaj bongustaj kukoj, kiuj, mi sciis, atendis min ĉe avino. Kaj kio pri la avĉjo? Li, kiel multaj edzoj en tiuj tagoj, tenis en granda kaĝo aron da kokinoj kaj kelkajn pompaĉajn virkokojn. Mi feliĉe helpis lin kolekti ovojn de la nestoj de la kvietaj kokinoj, sed mi ne alproksimiĝis al la virkokoj. Iu grandega nigra iam ĉasis kaj bekpikis min, do en mia infana menso mi konsideris tiujn miaj malamikoj.



Nia domo en Charters Towers. Tiu estis tipa domo en la urbo.

Piknikoj:

Nuntempe, familioj ofte piknikas; ili veturas al urboparko aŭ la marbordo aŭ la montoj. Sed konsideru urbon kie plejparto de la familioj ne posedis aŭtomobilon. Certe oni povis pikniki en la loka parko, sed kiel pikniki ĉe la rivero kiu distancis de la urbo 22 kilometrojn? Nu, dum la jaro estis 2 specialaj piknikoj kiujn mi entuziasme anticipis. Mia patro laboris en la ŝtata Fervoja Sistemo; ĉiun jaron estis organizita pikniko por la familioj de la fervojaj laboristoj, kaj kompreneble, ni veturis al la rivero per trajno. Ne necesis porti iun manĝaĵon, ĉar la Fervoja Sindikato provizis tion. Sekvis tre ĝuplena tago da tromanĝado, sunbrulado, kaj infanaj ludoj.

Ho jes, mi ne forgesu la alian piknikon. Tiu estis pli sobra afero kiun la preĝejo-pastro okazigis. Malnovaj malkomfortaj aŭtobusoj transportis nin al la rivero kaj tuj post kiam ni alvenis ni ricevis sukerbultojn. Kiu piknikas hodiaŭ

sen alkoholaĵo? Neniam aperis iaj drinkaĵoj dum niaj piknikoj, nur trinkaĵoj; teo por la plenkreskuloj kaj suko por la infanoj.

Filmoj:

Vivi sen televido? Ĉu eblis? Feliĉe estis kinfilmoj por nia plezuro. Se vi havas similan aĝon al mi (ho ne, mi ankoraŭ ne rivelas la aĝon) vi certe povas memori regulajn vizitojn al la loka kinejo, ĉiun sabaton, por la posttagmeza sesio. Troviĝis en Charters Towers du kinejoj. Unu, la Regent, estis pli luksa ol la alia, la Olympia. Tiel grandaj nomoj por tre ordinaraĵoj! Kial la Regent estis pli luksa? Ĉar ĝi havis tegmenton. Ambaŭ havis nur kanvasajn seĝojn kaj ofte dum filmo oni aŭdis ŝirsonon. Frap! Iu kompatinda filmspektanto falis planken. Mi amis la muzikajn filmspektaklojn; la "idoloj" kiujn mi adoris estis Kathryn Grayson kaj Howard Keel.

Malvarmaj Duŝoj:

Ni loĝis en luita domo kiu havis nur tre minimuman duŝejon. Certe ne estis varma akvo. Tio ne ĝenis nin dum la tre varmaj someroj en Charters Towers. Eĉ kvankam la vintroj estis mildaj, tamen ne estis plezuriga sento stari sub malvarma duŝo dum tiu sezono. Do, kompreneble, la tempo kiun ni pasigis en la duŝejo estis tre mallonga. Iomete da akvo, rapida frotado de la haŭto per sapo, pli rapida ŝprucado de akvo por forigi la ŝaŭmon, kaj la ofte ripetata klakado de dentoj.



Mia patrino kun mia nigra kato



Mi kun alia kato

Dorlotbestoj:

Iam, mia patro portis hejmen malgrandan hundon, pomerio-hundon. "Kia bela hundeto", ni entuziasmis. Fakte, tiu aĉa besto bonkonduktis nur por mia patro. Li rikanis je la cetero de la familio. Li ofte silente kaŝis sin sub mia lito kaj kiam mi sidis sur la lito por depreni la ŝuojn, li mordadis mian maleolon.

Mi multe preferis niajn katojn. Kiam ajn mi trovis forlasitan katidon, mi portis tiun hejmen kaj petadis al panjo ke ŝi akceptu ĝin. Okazis la kutima vort-batalo — “Ne” — “Sed panjo!” — “Ne, ne!”; kaj fine, “Nu, jes, sed tiu ĉi estos la lasta, definitive!” Mi ĉiam venkis ĉar mi sciis ke panjo kompatis la katidojn.

Adiaŭ al “La Mondo”:

Mi progresis tra la elementa lernejo, eniris la mezlernejon, kaj fine forlasis la komfortan brakumon de malgranda urbo kaj vojaĝis, ekscitate sed iom timeme al la nekonata fremdeco de granda urbego. Kaj ĉi tie mi ankoraŭ restas en tiu urbego, ne longe nekonata nek fremda. Ĉu mi iam revizitis la amatan hejmurbon? Jes, certe, kaj ĉiam la granda maljuna damo gracie kaj afable bonvenigis min. Restas en mia menso tre feliĉaj memoroj el miaj fruaj jaroj!

[Verko premiita en nia *Konkurseto II*] □

ELEKTRO KAJ LA PARANORMALO! ĈU ESTAS INTERRILATO INTER ILI?

de Frank Swift

Antaŭ ol ĉi tiu demando povas esti konsiderata, ambaŭ temoj devas esti difinitaj. Simpla difino de elektro estas ke ĝi estas nenormala stato de la atomoj aŭ molekuloj de iu korpo, kutime kaŭzita de eksceso aŭ nesufiĉo de elektronoj. Elektro montriĝas en diversaj formoj:

1. Tre ordinara ekzemplo estas en elektra lampo, kiam oni enŝaltis la elektron.
2. Fulmo estas videbla malŝargiĝo de elektro moviĝanta tra la nuboj, aŭ de la nuboj al la tero, kaŭzita de interfrotiĝo de varmaj kaj malvarmaj amasoj da aero.
3. Tamen aliaj efikoj de elektro estas nevideblaj per la homa okulo, kaj montriĝas nur kiam oni ŝaltas la elektron al elektra motoro; aŭ kiam speciala aparato estas uzata, kiel en Kirliana fotografio¹. Ni ĉiuj havas elektran fluon konstante fluantan tra niaj korpoj. Sen ĝi, niaj cerboj kaj koroj ne povas funkcii, ĉar ili bezonas elektron por porti la aŭtonomajn impulsojn, kiel de la korbatado kaj la enspirado de aero, kaj de niaj sendependaj agadoj, kiaj marŝado, parolado, kantado, naĝado.

Kelkaj personoj pretendas ke ili povas vidi kiel nimbon la eksteran montriĝon de elektro en homoj, sed la sola maniero per kiu nunmomente tiaj elmontroj povas esti registritaj estas per la Kirliana fotografio. Tiu ĉi uzas altan voltokvanton da elektro por krei figuraĵojn en arĝenta halogenida fotograffilmo

1. Seymon Kirlian, el Krasnodar, Rusio, en la 1940'oj konigis sian novan inventon de metodo fotografi la “aŭrojn” (nimbojn) de vivantoj kaj aliaj aĵoj. La valideco de la rezulto estas multe pridisputata. En ĉi tiu artikolo la aŭtoro pledas por ĝia valideco.

sur vitro. Ĉiu objekto disdonas aŭron, kiu estas konstanta rilate al koloro kaj grado, por senvivaĵoj; sed ĝi varias rilate al intenso kaj koloro se homa aŭ alia vivaĵo estas fotografita. Eksperimentoj montras ke homo povas influu la etendiĝon kaj koloron de la aŭro per la ŝanĝo de trankvilaj pensoj al fortegaj pensoj.

Specialistoj uzas Kirlianan fotografion, kiun oni kelkfoje priskribas kiel *koronan malŝargan fotografadon*, kiel diagnozan ilon por kuracistaj celoj.

Estas diversaj metodoj produkti elektron. Ekzemple per la turnado de metala rado interne de magneta kampo; aŭ per la meto de du malsimilaj objektoj, precipe metalaj, en pelvon da acidigita akvo. Se ni marŝas sur nilona tapiŝo sen porti kondukcapablajn ŝuojn, ni akumulas “statikan” elektron en niaj korpoj, kiu ofte sufiĉas por kaŭzi ke ni sentu elektran ŝoketon kiam ni tuŝas metalan objekton konektitan al la tero. Magneto levas metalajn objektojn el fero, per la elektro troviĝanta en la magneto. Tiuj ekzemploj ilustras kelkajn el la rimedoj per kiuj elektro povas esti produktata kaj elmontrata.

Ĉu elektro rilatas iamaniere al paranormalaj eventoj?

Mi komencas per la aserto ke la “paranormalo” ne signifas “supernormalo”-n. Kiam ni uzas la terminon “supernormala”, ni aludas al io sur nivelo pli alta ol io ajn en la naturo, kutime spirita aŭ disimila en sia karaktero. La paranormalo estas io aldone al, aŭ super tio, kio estas rigardata kiel normalo. La vorto devenas el kombino de la greka vorto “para”, kiu signifas apudecon, kaj la latina vorto “normalis” kiu signifas konformecon al normo, t.e. tio kio estas tipa aŭ kutima.

La plej oftaj ekzemploj de la paranormalo estas fantomoj, aliaj aperaĵoj, kaj bruemaj spiritoj. Tra la tuta kronikita historio, homoj raportis vidon pri fantomoj, kutime rilate al mortaj homoj, kaj pri aperaĵoj de ŝipoj, bataloj, kaj pasintaj kaj estontaj eventoj. Rilate al bruemaj spiritoj, okaze oni aŭdas nur frapadon sur muron aŭ pordon; aŭ paŝojn piederantajn trans plankon. Sed estas multaj raportitaj spertoj rilate al perforta bruema spirita agado dum kiu mebloj leviĝas en la aeron kaj ĵetiĝas trans ĉambrojn. Tre ofte estas almenaŭ unu junulo, plej ofte knabino, en domo en kiu bruema spirita agado estas raportita. Se la infano eliras la domon, la bruema spirita perturbo ofte ĉesas, sed rekomenciĝas post la reeniro de la infano en la domon. Kelkaj sciencistaj esploristoj proponis ke infanoj kiuj estas emocie maltrankvilaj eble eligas, per iu rimedo ĝis nun nekonata, elektran transsendon kiu povus manifestiĝi en la formo de bruoj, kiaj tiuj de persono frapeganta aŭ bateganta sur muron, aŭ marŝanta trans plankon. Se tiu hipotezo estas ĝusta, tio signifas ke kaj la infano kaj la bruema spirito estas unusama.

Tamen, ŝajnas neeble ke nura mensa potenco povus ĵeti fajencaĵojn, kuir-ejajn ilojn, kaj eĉ pezajn meblojn trans ĉambrojn ŝajne per sia propra volado. Eventoj estas raportitaj dum kiuj litoj, en kiuj infanoj kuŝas, forte moviĝas de flanko al flanko kaj eĉ leviĝas metron aŭ pli en la aeron sen videbla kaŭzo. Sekve ni devas pripensi la eblecon ke en iaj mensaj statoj infano agas kiel kondukilo por nevideblaj vivformoj kiuj ricevas potencon el la elektraj impulsoj venantaj el la cerbo de la infano, dum la infano ne scias ke ĝi ludas parton en la eventoj.

Alia aspekto de la paranormalo estas la raportitaj vidiĝoj de fantomoj de homoj kiuj, oni jam scias, estas mortaj. Kutime fantomoj ne parolas, sed ekzist-

as raportoj pri fantomoj kiuj montris al modernaj homoj kie multevaloraj eroj estas enterigitaj aŭ kaŝitaj, kaj pri fantomoj kiuj rekreas scenojn de la murdo de homoj, kaj indikas kie la kadavro troveblas. En Usono kaj la policianoj kaj la FBI ofte uzas mediumojn por trovi kadavrojn, fojfoje sukcese. Unu mediumo estas tiel sukcesa, ke eĉ severaj skeptikuloj ne povas klarigi kiel la virino preskaŭ ĉiam povas provizi al la FBI kaj la policianoj la informon kiu ebligas la solvon de multaj krimoj. Tiu virino rolis en dokumentaj filmoj en kiuj usonaj policianoj konfirmis ŝian misteran kapablon iel kontakti mortajn homojn kiujn la policianoj serĉis. Je unu okazo, ŝi informis la policianojn ke perdita knabo, kiun la policianoj serĉis, estis kaptigita en herbaĉoj funde de rivero. La pri-skribo de la loko donita de la virino, kiu estis centojn da kilometroj for de tiu loko, estis tiel preciza ke la policianoj trovis la kadavron de la akcidente droninta knabo tre rapide.

Kvankam fantomoj ofte nomiĝas aperaĵoj, estas multaj okazoj en kiuj fantomaj ŝipoj kaj aviadiloj, kaj eĉ pasintaj bataloj, revidiĝas longatempe post la fino de la bataloj kaj la ŝipoj kaj la aviadiloj delonge ĉesis ekzisti. Ĉu povas esti ke ĉio okazanta en la mondo registriĝas en iu paranormala formo kiu povas esti alirebla se la taŭga stato de menso agas kiel ricevilo, iel simile al radio-ricevilo? Se tiel estas, kaj ni povus atingi la ĝustan mensan staton, tiam ni teorie povus mense vojaĝi malantaŭen en la tempo kaj eble vidi la dinosaŭrojn kiaj ili vere estis.

Estas multo kiun ni ne povas kontentige klarigi en la mondo hodiaŭ, kiaj la raportoj pri televidiloj kaj aliaj perelektre funkciantaj iloj, kiuj funkciigas sin mem post la disiĝo kun la elektro; tio indikas ke ekzistas aspektoj de la elektro kiujn ni ankoraŭ ne komprenas. Ĉu povas esti ke la elektra fluo en niaj cerboj aŭ el aliaj fontoj servas kiel ponto inter la normalo kaj la paranormalo, kaj respondecas pri fantomoj kaj aliaj fenomenoj? Jen eblo, kiun vi povus pripensi.

[Ĉi tiu artikolo estis verkita por prezento en la AEA/NZEA-kunkongreso en Margate Qld, Aŭstralio, en januaro 2004.] □

AEA ESTRARO 2004

Prezidanto: Matthew Maguire

Vicprezidanto: Sandor Horvath, 31 Addison Rd, Black Forest, SA 5035. (08) 8297 6249 sandor.horvath@unisa.edu.au

Vicprezidanto: Jennifer Bishop

Sekretario: John Gallagher

Vicsekretario: Henry Broadbent, 63 Kennedy Rd, Somers VIC 3927. (03) 5983 2731

Kasisto: Stephen Pitney

Vickasisto: Ken Rolls

SUKCESIS EN EKZAMENOJ

Raportas Marcel Leereveld

Baza: Tom O'Grady (Qld)

Meza: Jonathan Moylan (NSW)

Korespondkurso Servo de AEA 2003

raporto de Hazel Green

Dum la jaro 2003 ĝis decembro, 8 homoj aĉetis 13 perkorespondajn kursojn de AEA. Mi elsendis 5 ekzemplerojn de la unua kurso *Bonan tagon*, kaj 2 de ĉiu el la aliaj 4 niveloj. Post peto mi sendis al Indonezio libron de *Bonan tagon*, sed tio neniam alvenis.

Al la kursgvidantoj mi volas esprimi dankon. Ili ĉiam diras “jes” kiam nova studanto bezonas helpon, ili helpas kiam la studantoj sendas ekzercojn, kaj ili pacience atendas kiam la studantoj ne sendas ekzercojn.

Interesitoj, sed ne multaj, sendas demandojn pri la servo per poŝto, retpoŝto, aŭ telefono. Kvankam mi kredas ke niaj 5 kursoj ankoraŭ havas valoron por kelkaj, mi ĉiam donas informon ankaŭ pri interretaj kursoj kaj la senkosta perpoŝta kurso. □

HISTORIO DE ESPERANTO EN AŬSTRALIO

Je la jaro 2005 estos la centjariĝo de la oficiala komenciĝo de Esperanto en Aŭstralio. La unua klubo en Melburno komenciĝis en 1905. En 1985 Ray Ross kolektis informon kaj arigis ĝin por eldoni *Esperanto en Aŭstralio (1905 -1985)*. Estas mia espero ke ni povos ĝisdatigi tiun verkon por la centjariĝo de Esperanto en Aŭstralio.

Do se vi havas informon (aŭ povos studi kaj lerni) pri Esperanto en via regiono, sendu ĝin al mi, mi petas. Mi deziras kolekti faktojn pri la lokaj kluboj, organizoj, agemuloj, lokaj kursoj esperantaj, okazoj, programoj ks. Krom la faktoj mi deziras kolekti rakontojn pri tiuj samaj.

Do ne prokrastu. Skribu nun, mi petas, kaj sendu al:

Terry Manley 50 Alagalah Street Narromine NSW 2821 teren@ans.com.au



Por Rídiĝi Vín



Rakontas en sia oficejo virino, ke ŝia amanto donacis al ŝi oran ringon. Nun ŝi ne scias, kiel klarigi al sia edzo, kiel aperis tiu ringo.

Konsilas ŝiaj gekolegoj:

“Diru, ke iu el viaj amikinoj pruntedonis ĝin al vi...”

“Ne, tio ne taŭgas, diru, ke vi ricevis neatenditan bonifikon, kaj ke vi eliris kaj aĉetis la ringon...”

Finfine iu kolego diris: “Simple diru, ke vi trovis ĝin en buso. Ekzemple mia edzino antaŭ kelkaj tagoj trovis braceleton en buso... ! [el *Tamen Plu*] □

TUTMONDIGO KAJ LINGVOJ

de Santiago Torné

Nuntempe inter kvin mil kaj ses mil lingvoj estas parolataj en nia mondo. Ŝajnas amuza tia esprimmaniero, ĉar, laŭ nia opinio, la diferenco inter tiuj nombroj estas astronomia. — Konsideru: persono kiu maksimume kaj post longaj pezaj kaj longedaŭraj studhoroj povas regi nur du lingvojn, maksimume tri (sed la trian nur elemente). Se ni legus ke la nombro da lingvoj parolataj estas, ekzemple, inter 5034 kaj 5039, nia opinio pri la afero kompreneble estus tute alia.

Laŭ aliaj vidpunktoj, la kvanto da lingvoj parolataj superas ses milojn. Mirinde, ĉu ne? Sed tiu ambigueco estas facile klarigebla, se oni akceptas ke kiam en teritorio oni parolas lingvon neniam skribitan, estas tre malfacile scii ĉu la lingvoj parolataj en du najbaraj vilaĝoj estas la sama lingvo, aŭ apartaj lingvoj. Pli ol tri kvaronoj de la registritaj lingvoj estas nur parolataj, neniam skribitaj. Multaj el ili havas malpli ol cent mil parolantojn; la plejmulto el ili havas malpli ol dek mil.

Ĉiuj lingvoj spertas la fenomenon de la tutmondiĝo [globalizo], kiu vole/nevole devigas siajn parolantojn mastri aliajn lingvojn.

George Orwell sendube plene trafis, kiam li diris ke la plejmulto de la socia koruptado komenciĝas per la lingvo. Kiel kutime oni trovas ke la afero antaŭeniras laŭ vojoj pli aŭ malpli similaj!

Certe, malpli ol 400 estas la lingvoj kiuj plene povas anticipi ke ili estos uzataj de sufiĉe multaj personoj por povi daŭradi, por ke oni plu trovu ilin en la lerneja sistemo kaj ankaŭ en la informadiloj. Eble ankaŭ pro la fakto ke tiuj lingvoj ricevas helpon de politikaj aŭtoritatoj. En Hispanio, la kataluna, la galega, kaj la eŭska estas inter la lingvoj kiuj ricevas tiun helpon.

La latina ludis rolon kiel internacia lingvo por la interlekta interŝanĝado ĝis la komenco de la moderna epoko (18a jarcento), kiam la franca anstataŭis ĝin. Poste la germana (19a jarcento) atingis grandan prestiĝon kiel filozofia lingvo, kaj samtempe la angla en la internacia mara komercado.

Oni povas atribui la ascendon de la hispana lingvo al la fakto ke ĝi estis la ĉeflingvo parolata en la suda kaj centra Amerikoj, kaj ke ĝi (post la angla, kompreneble) estas la lingvo plej studata en Brazilo kaj en la Malproksima Oriento. Pro tio, la hispana estas iurilate internacia lingvo; certe ĝi estas lingvo parolata en pluraj landoj, sed oni ne povas anticipi ke ĝi estos tutmonda lingvo.

Ĉar la angla estas la lingvo de la ĉefa monda potenco, ĝia diskonigo aspektas kiel specimeno de imperiismo. Sendube ĝia rolo de internacia lingvo ne estas dubinda. Ke la angla estas la plej parolata de hotel-portistoj kaj -akceptistoj, jes. Ke la nuraj personoj kiuj orgojle povas senerare regi tiun lingvon estas la denaskuloj, ankaŭ jes. Sed...nenion pli.

La latina lingvo, imperia en la antikva mondo, antaŭ jarcentoj disiĝis en aliajn novajn romiecajn lingvojn, kaj nun restas nur kiel klera lingvo sen spur-oj de sia iama pleninternacieco.

Sed la monda bezono por internacia lingvo plu vivas; allasi nacian lingvon por solvi tiun bezonon estas nur diskriminacia solvo; agnoski imperian lingvon

al la angla, kiel oni agnoskis en antikvaj tempoj al la latina, alportas nin al la demando: Ĉu povus okazi al la angla la samo kiu okazis al la latina.

Por ni ĉiuj esperantistoj, plezure ni ripetas ke la vera internacia lingvo, kiu vere kaj finfine solvus tiujn malfacilaĵojn, estus Esperanto. Grandega ideo de Zamenhof por alia ideo, multoble ne tiom bona kiom la tre konata tutmond-iĝo.

[El KAE-*Informilo*, januaro-februaro 2004]

Demando mia: Ĉu ne estas ankaŭ same pri Esperanto: ke la nuraj personoj kiuj orgojle povus senerare regi tiun lingvon estus la denaskuloj, kaj nur se unu el la gepatroj eksperte scipovus ĝin? Kaj kial tutmonde uzata Esperanto ne ankaŭ disiĝus en dekojn da apartaj lingvoj, same kiel la latina kaj (laŭ la verkinto de la artikolo) la angla? — [db]. □

NEKROLOGO: MARJORIE ELLYARD

nekrologas Jennifer Bishop



Marjorie Bell Ellyard, naskita la 13an de januaro 1913 en Brisbano, Aŭstralio, forpasis la 23an de decembro 2003 en Kanbero, edzino de Samuel William George Ellyard forpasinta en 1983, ankaŭ esperantisto.

Escepta patrino de ses infanoj inkluzive de kvin filoj kaj unu filino, ŝi estis ankaŭ avino de 11 genepoj.

Sekretario de AEA kaj ŝia edzo Kasisto dum Ralph Harry estis Prezidanto, ŝi restis UEA-delegito en Kanbero 1979-2000.

Nur unu filo, Peter, profesia Futuristo (Antaŭenrigardanto), interesiĝas pri Esperanto. Lia intereso daŭras kaj nun unu nepo, James Ellyard, ekinteresiĝas.

Marjorie kaj ŝia edzo estis ambaŭ instruistoj kaj direktoroj de lernejo. Marjorie ankaŭ fariĝis instruisto de surduloj. Talenta instruistino de naturo, ŝi dediĉis sin por certigi ke lernado estu distra afero.

Ŝi multe intruis Esperanton kaj ĉeestis plurajn UK-ojn, i.a. en Varna, Havano, Pekino kaj Aŭgsburgo. Unu el ŝiaj plej konataj agadoj temas pri la kreo kaj eldono de populara vortludkompleto. Ŝi ankau sukcesis en la “Kler-eca”, la plej alta nivelo de ekzamenoj de AEA.

La Komisiito de AEA por Ekzamenoj, Marcel Leerveld, menciis ke dum multaj jaroj Marj estis valora kaj helpema membro de la Ekzamena Komitato. Nur kelkajn semajnojn antaŭ sia morto ŝi ankoraŭ donis al li siajn pozitivajn konsilojn pri akceptado de kandidato por la “klereca” ekzameno.

Sentante la perdon por la Esperanto-movado en Aŭstralio, la membraro de AEA kondolencas sincere la familion de Marj. □

ĈU GRAVAS DO LA NOMO?

de Katarina Mortimer

(Tradukita de Libby kaj Arturo Mortimer)

“Saluton Doris, jen parolas Marta. Mi telefonas por deziri al vi feliĉan naskiĝtagon kvankam iom malfrue. Mi ne telefonis al vi tiun tagon, kara, ĉar io terura okazis. Ĉu vi legis la naskiĝanoncojn tiun tagon – vi ja legis ilin – ĉu vi do vidis, ke al Brian kaj Marianne (ili estas mia bofrato kaj lia edzino) naskiĝis fileto? Sed ĉu vi vidis ankaŭ lian nomon? Jes, ĝi estis eĉ intercitile skribita – ‘Antonio’. Do, ĝuste pri tio mi intencas informi vin. Atendu iomete dum mi ekbruligos mian cigaredon. Do, tuj kiam mi vidis tiun nomon mi deziris telefoni al ili por demandi, ĉu tio estas iu speco de ŝerco, sed kompreneble mi ne povis telefoni al ŝi, ĉar ŝi estas en la hospitalo, kaj li ankoraŭ ne havas telefonon en la hejmo. Mi do telefonis al s-ino Walters, mia bopatrino, vi jam renkontis mian bopatrinojn, ĉu ne? kaj informis ŝin ke, se estis ja vere, ke Fred kaj mi tute ne intencas permesi tion. Ŝi diris, ‘kvietiĝu’, ĉar ĉio estas jam pridiskutita, kio montras, ke ili ĉiuj ankoraŭ sentis sin kulpaj, sed ŝi diris, ke ili elĉerpis ĉiujn porknabajn nomojn, (ĉi tiu estas ilia kvina, kiel vi scias), kaj ili findecidis, ke lia nomo estu Antonio! Ĉu mi ekfuriozis? Mi diris, ke la juna frato de Fred ŝtelis nian nomon – la nomon, kiun ni jam antaŭ tri jaroj elektis por nia filo. Ni tiam informis ĉiujn geamikojn kaj parencojn, ke ili evitu tiun nomon, ĉar ni intencas havi la nomon Antonio!”

Povas esti, ke vi neniam havos filon, diris ŝi. Povas esti, konsentis mi, sed ni ja rajtas esperi kaj tiuj nomŝtelintoj ne havas rajton al nia nomo. Mi sentas kvazaŭ ili ŝtelis nian infanon; mi neniam sentos la saman pri ili, kaj dum la tuta vivo de tiu infano mi neniam nomos ĝin Antonio, kaj tiam mi ĉesigis la telefonkonversacion.

Poste mi telefonis al ĉiuj niaj parencoj, kiuj konsentis kun mi, kaj ili ĉiuj diris, ke estis malestiminde.

Ĉiuokaze, Fred vizitis Brianon kaj konfrontis lin. Diris Fred, ke tio signifas, ke du knabetoj nomitaj Antonio Walters, kaj kiel oni diras – estas ĉiam la infanoj, kiuj suferas pro la egoismo de la gepatroj – similaspektas, kaj ĉar ni loĝas en la sama ĉirkaŭurbo, la knaboj iros al la sama lernejo, verŝajne eĉ al sama klaso. (Ho! Ne kara – ĝis nun mi ne estas graveda, sed ni penas, ĉiam ni penas.)

Al tio ĉi Brian nur flegme insistis, ke neniu havas ekskluzivajn rajtojn al nomoj, kaj ke ni estas liberuloj en nia propra lando. Tiam Fred ĉesigis ĉiujn rilatojn kun Brian, kaj ni ne sendis al ili gratulkarton!

Imagu nian surprizon, kiam miaj gebopatroj vizitis nin kaj diris, ke ili ne povas toleri, ke iliaj filoj batalas dum la tempo de ĝojo, kaj ili aldonis al tio multajn sensencaĵojn. Sed mi diris al ili rekte en la vizaĝon, ke se ili ne ŝanĝos sian opinion antaŭ la baptiĝo de la suĉinfano, ni neniam plu parolos al ili. Tiam s-ro Walters pike diris, ke ni havas nenion por montri pri tio. Antaŭ ol mi povis bridigi min, mi diris, ke ne estas pro manko de penado kaj ke ne estas nia

kulpo, ke ni ne bredas kvazaŭ ni estus kobajoj. Ĉu tio, laŭ vi, estis tro terura? Ankaŭ ne laŭ mi. Sed la maljuna besto diris, “mi vetos, ke ne estas la kulpo de nia Fred!” Do ekstaris Fred dirante, “Paĉjo, vi ne parolu al mia anĝeleca edzino en tia maniero! Ŝi estas tiom bona kaj pura kiom Marianne, kaj pli lerta!”



Arturo Mortimer kiel Marta

Tiam s-ro Walters montris sian veran memon ekkriante, ke Marianne komprenis la vicordon de gravaĵoj. Unue ŝi havis infanojn, tiam televidilon, videoludilon, lavmaŝinon kaj lustrojn.

Tio estis nur la komenco, Doris! Fred diris, ke Marianne estis nur muse eta objekto kun nenia seksallogo, kaj s-ino Walters diris, ke mi tro farbas la vizaĝon, kaj ŝi miris kiel ŝia Fred, por kiu ŝi faris ĉion en sia hejmo, povus manĝi mian kuirajon.

Diris mi, “ĉu vi faris ĉion por Fred? Ho! Liaj subvestoj estis hontindaj kiam ni geedziĝis. Mi bone komprenas, kial s-ro Walters elkuris el la hejmo por drinki tiom multe, se la domo estis en la sama stato kiel iliaj vestoj!”

Ŝi respondis, ke ŝi komencis per malmulto, sed ke ŝi almenaŭ havas hejmon, ne antisepsan pupohejmon kiel viaj gepatroj, kaj mi diris, ke ĝi estis sufiĉe bona por la festado de niaj gefianĉiĝo kaj geedziĝo. Mi neniam vidis vin, avarulo, gastigadi iun ajn, kvankam mi supozas, ke se viaj geamikoj estas tiaj, kia via filo perfida, ili ne estas havindaj! S-ino Walters ekploregis kaj diris, ke mia patro estis nur ordinara metiisto, kaj la stulta maljunulo diris, ke mi devus esti batata, sed ke ŝajnas, ke Fred ne estas sufiĉe vireca por fari tion. Tiam diris Fred, ke li estas pli vireca ol sia patro, kaj iom post iom ĉio ĥaosiĝis: — s-ino Walters eĉ ŝirkriegadis, kaj s-ro Walters ekkriis, ke li estas pli bona viro ol mia patro, aŭ Fred, aŭ Brian, kaj ke li komencis per nenio; kaj li eltenis eĉ la Depresion, kaj diris, ke Fred estas tro granda por siaj botoj, post kiam li fariĝis reprezentisto de la administrantaro, kaj li diris plue, ke tio estis eĉ ne laboro, kiam li komencis sian vivon; kaj Fred diris, ke lia patro estas senscia maljunulo. Tiam hejmen iris ges-roj Walters. Nun ni ne parolas unu al la aliaj, do ne plu gravas se ni havos alian Antonion, ĉar nia Antonio ne sin miksos kun siaj gekuzoj de tiu flanko de la familio. Ĉiuokaze, Doris, ĉu vi pensas ke eble “Antono” sonas pli elegante? [El *Tamen plu*] □

• **Radio-stacioj aŭskulteblaj en Esperanto per Interreto:** ĉe la adreso <http://www.tejo.org/uea/Radio-Stacioj> oni trovas liston kaj detalojn pri ĉirkaŭ dudeko da radiostacioj kiujn oni povas aŭskultadi per Interreto; kaj, tre grave, oni donas ne nur la retadresojn, sed ankaŭ retejojn kie oni povas aŭskulti arkivon de malnovaj esperantlingvaj programoj de tiuj stacioj. □



Dezirias Korespondi



Mi nomigas KASHIRA Djuna MU'PFANO,
Mi estas kongolandano kaj mi vivas en Kongo.

Mi tre interesiĝas pri Esperanto kaj aliaj lingvoj kiel la angla, franca, ktp. Tial ni decidis formi Esperanto-klubon ĉi tie en urbo Goma, kiu estas en afrika kontinento en la orienta provinco (Norda Kivo) de Kongo.

Mi estas dudeknaŭjara.

Nun ni volas perfektigi nin en tiu lingvo, mi estas la vicprezidanto de nia klubo sed mi volas vin klarigi al mi multajn interesajn aferojn kiujn mi eble eĉ ne atentis.


Mi ŝatas vojaĝi kaj vidi aliajn lokojn.

Mi tre volas studi sed ni ne havas rimedojn.

Mi studis tri jarojn en universitato kaj mi jam finis en angla lingvo kaj afrika kulturo.

Atendante la plezuron legi vian baldaŭan respondon, bonvolu akceti miajn korajn salutojn.

munfano.kashira.djunakashira@yahoo.fr

[*Ekzistas du afrikaj landoj nomitaj "Kongo". Ĉi tie temas pri la lando kiu en la UEA-Jarlibro nomiĝas "Kongo DR".* 

Korektoj por la Adreslibro

Paĝo 17: Brisbane Esperanto-Societo
Sek. Vakas

Paĝo 22: *Brisbana Babilado*

Redaktoro : Alan Grant, 32 Abbey Street, Forestdale Qld 4118

EN LITOVIO: KIOM DA HOMOJ PAROLAS ESPERANTON

En 2001 en Litovio okazis tutlanda registrado de la loĝantaro. Inter dekoj de diversaj demandoj, la loĝantoj estis enketitaj ankaŭ pri scipovataj lingvoj. Nun la Ŝtata Statistika Departamento aperigis tre detalan analizon pri la rezultoj de tiu tutlanda registrado. Laŭ ĝi, en Litovio oni scipovas 41 lingvojn. Estas interese, ke Esperanto en tiu statistiko okupas sufiĉe bone la 16an lokon laŭ la kvanto de scipovantoj de la lingvoj. Laŭ tiu oficiala statistiko, en Litovio estas 858 personoj kiuj scipovas Esperanton.

[El: *Ret-info* <http://www.eventoj.hu>] 

RECENZAS VIA REDAKTORO

Edmund Grimley Evans: English-Esperanto Esperanto-English Mini Dictionary. Esperanto Association of Britain. 2003. 64 pages.

Takso: ○○○○○

This pocket sized dictionary is one of the most handy little pocket sized aids an Esperanto student could have. It is very carefully prepared by one of our best known British Esperantists. The first part consists of an Esperanto to English vocabulary listing, alphabetically arranged, which gives not only the meaning of each basic terms but also the meanings of its most common compounds. The second part consists of an English to Esperanto vocabulary, with notes on special usages. As examples:

dispon/i have available; ~ata available

don/i give; al~i add; el~i publish (print); el~ejo publisher; sin~a devoted

replace (be a replacement for) anstataŭ/i, (find a replacement for) ~igi

run kuri; run away fuĝi

This is not a detailed lexicon for the linguist, but a handy booklet for use when a novice is stuck for a word. And it does its job very well. □



Interrete



• **Retkurso pri “Komputiko kaj Programado”:** Lige al “Tago de Esperanto” Gian Piero Savio lanĉis interretan kurson pri “Komputiko kaj Programado”, projektita laŭ la metodo “programita lernado”. Kvankam la kursa materialo estas en nivelo de supera lernejo, la instrumetodo celas komprenigi la temojn kaj praktikigi la sciojn al ĉiu serioza kaj laborema komencanto.

La nuna kurso traktas la temojn:

- Enkonduko en Komputilajn Sistemojn
- Analogaj kaj Duumaj Signaloj
- Komputila Memoro
- La Procesoro

Averaĝa ĉapitro de la kurso enhavas 15 paĝojn, kaj fine de ĉiu ĉapitro aperas “Kvizo” kaj “Refreŝigo” kiuj plezurige helpas vin enkapigi la ĵus lernitan materialon.

Jen la adreso de la unua kurso:

<http://www.esperanto.org.il/komputiko-kurso>

La kompilinto volonte akceptas viajn komentojn:

Gian Piero Savio, saviogp@zahav.net.il

□

SKRIBAS LA LEGANTOJ

Skribis Jonathan Moylan:

Kara Redaktisto,

Trale gente la liston de AEA diplomitoj, iom mirigis min ke estas preskaŭ la sama kvanto de nemembraj diplomitoj kaj membraj diplomitoj. La aliaj 160 membroj certe kapablas fari ekzamenon — ĉe la kongreso en Melburno kun 80 partoprenantoj eĉ la komencantoj apenaŭ krokodilis — sed nur 63 diplomitoj ĉie en Aŭstralio? Eĉ kelkaj honoraj kaj dumvivaj membroj ne faris ekzamenon — kion pensas nia klera ĉefekzamenisto?

Aparte, nia majstro Bob Felby faris preskaŭ ĉiun ekzamenon en la ĝusta ordo — BEMSA! Bone, eĉ bonege!

Amike via,

Jonathan Moylan

Novkastela Esperanto-Societo

<http://www.esperanto.org.au/newcastle.html>

Komento de la redaktoro: ankaŭ mi mem neniam faris ekzamenon... Sed mi scias ke “nia klera ĉefekzamenisto” dividas vian senton. Aliflanke, Bob Felby, unu el niaj plej kompetentaj esperantistoj, estis kompetentega pri Esperanto longe antaŭ ol fari la ekzamenojn. Liaj ekzamensukcesoj estas “kremo sur la kuko” — sen la kremo, la kuko jam estis perfekta. □

Skribis Paul Desailly:

Transloĝinte Pekinon el la kamparo de provinco Hebei antaŭ 5 monatoj por esti apud moderna hospitalo ni ĝojas anonci:

1. En Pekino la 30an de decembro, en Hospitalo 301 de la Popola Liberiga Armeo de Ĉinio, Velanta naskis bebon (3750g) kies nomo estas Edwin Chen-Desailly. Velanta kaj Eddie, se ne la patro, tagon post tagon plifortiĝas. De Velanta Eddie lernas la ĉinan, la anglan de mi, kaj ĉe la manĝotablo ni ĉiuj parolas la internacian lingvon.

La bopatrino estas mia komencanto. Ni ekzamenas eblecon starigi en 2005 lernejon de la angla kaj Esperanto en Xiangtan, la hejmurbo de fama subtenanto de Esperanto, prezidento Mao, kaj de mia edzino.

2. Marte en moderna lernejo por studentoj de ĉiuj aĝoj mi gvidos Esperantokurson. Ankoraŭfoje, la rektoro kondiĉigas ke tio okazu per la angla, almenaŭ ĝis kiam li taksos komercajn rezultojn kaj sondas reakciojn de siaj klientoj. Kvankam English Language College kuŝas 15 km sude de la UK-ejo ĝi situas nur minuton de metroo-stacio, Da Wang Lu, apud la urbocentro.

pauldesailly@yahoo.com

[Teksto kunmetita el du leteroj.] □

Skribis David Whitmore:

After reading in *Esperanto sub la Suda Kruco* (Jan.-Feb. 2004) your essay [“Ĉu vere lingvo = penso?”] I must admit that the last seven lines gave me quite a shock — a very pleasing one. I especially appreciated the final four words, i.e. “Nur Esperanton aŭ nenion!”

Over the years, of course, I have read quite a few articles on that subject,

and it seemed to me that all of those authors had the common goal, that of widespread intercommunication, but only on their own terms. Perhaps I am wrong, but I believe that those writers' greatest disappointment would be a successful and complete solution of their problem, international communication, by some means other than Esperanto.

I thought I was the only one with thoughts like those expressed in the last 7 lines. □

EL LA REGIONOJ

NSW: Raportas Margaret Chaldecott

Venis telefonvoko de ino kiu volis tradukon de bondeziroj metotaj sur afiŝoj dum venonta festo, pri la kvindeka datreveno de la geedziĝfesto de ŝiaj boĝepatroj. Mi faris tion, diris ion pri la flago, kaj demandis kial ŝi volas havi la tradukon. Ŝi estas la bofilino de Ronald Gates!!! Ili festos dum la venonta vendredo (19 Decembro). Interesa novaĵeto por *EPK* kaj *Telopeo*

La NSK-anoj (ĉefe la sidnejanoj, kaj kelkaj eksterlandanoj) festis pri Zamenhof la 13an de Decembro 2003.

La ĉefa parolado estis de Rainer Kurtz, kiu klarigis la bezonon por neŭtrala lingvo por Eŭropa Unio kiam la grupo ricevos la novajn anojn en 2004. En la komenco, necesis eble 111 kombinoj de lingvoj: A-B, A-C, B-E, ktp; sed en la venonta jaro tiu cifero iĝos pli ol 400.

Denis Murphy montris sian sperton pri "parolado el la ventro" (ventriloquist). Li uzis tri diversajn pupojn kaj poste "ĵetis" sian voĉon al iu laboranta alte kiu bezonis ŝtupetaron, kaj al alia laboranta malalte kiu devis meti la ŝtupetaron en bonan lokon.

Manlianoj prezentis du malgrandajn teatraĵojn, kaj alia manliano, Roger Springer, muzikis sakŝalme.

Dum kaj post tetrinkado kaj manĝado de sandviĉoj ktp, estis multe da interparolado.

Novkastela Esperanta Societo: Raportas Jonathan Moylan

Karaj gesamideanoj,

Feliĉan novan jaron! Jen la unua novaĵletero de 2004. La pasinta monato estis tre sukcesa, sed mi jam raportis pri la plejmulto de la pasinta monato ĉar la novaĵletero estis malfrua. Nia kunveno estis pli-malpli granda, kaj 4 homoj aliĝis al AEA.

Okazontaj:

Venonta kunveno: Sabato, 31a Januaro je la 3a ptm ĉe la Novkastela Ekologia Hejmo (Newcastle EcoHome), 67a Hobart Rd. New Lambton 2305 (diagonale kontraŭ "West's"). Se vi volas veni, bonvolu informi min pere de retroŝto aŭ alia kontaktmetodo. Ĉiu estos bonvena!

Societaj novaĵoj:

Nia ĉiumonata kunveno okazis je Sabato, Januaro 3a ĉe la Ekologia Hej-

mo. Andrew, Josh, Tony, Jonathan kaj la ĝemela fratino de Jonathan — Melanie — ĉeestis. Ni raportis iomete pri novaĵoj kaj balais la plankojn por helpi la Ekologian Hejmon dum kelkaj minutoj antaŭ nia leciono. Ni faris la unuan kaj duan lecionojn de *Jen Nia Mondo* kaj preparolis kelkajn esprimojn kiel "Nedankinde", kaj la uzadon de la sufikso "-in". Memkompreneble, ĉiu komprenis ĉion kaj la leciono estis plezuriga ekzercado.

Bedaŭrinde, Sue Hill (la enloĝanto de la Ekologia Hejmo) kaj Shani (la filino de Sue) translokiĝos ĉi tiun monaton, sed ili diris ke la venontaj enloĝantoj probable permesos nin daŭrigi niajn kunvenojn tie. Ni probable vidos ilin en la estonteco, kaj ili ambaŭ daŭre lernas Esperanton.

Por la okazontaj kunvenoj:

Ĉiu kunveno de nun estos lernado per *Jen Nia Mondo*, kaj post kelkaj monatoj ni povos forigi la anglan lingvon de niaj kunvenoj. Se vi deziras ankaŭ havi la liston de libroj kiujn ni havas, simple skribu al mi.

www.esperanto.org.au/newcastle.html

Sudaŭstralio: el *Tamen Plu* (januaro 2004)

Pri la festo zamenhofa

Kiel vi ĉiuj scias, la festo zamenhofa okazis dimanĉon la 14-an de decembro 2003 en la malantaŭa parto de la Komunumejo en Tynte Street.

Prenis parton pli ol dudeko da geesperantistoj kaj iliaj geamikoj.

La programo estis, kiel ĉiam, tre varia kaj amuza. Komuna kantado kaj multaj teatraĵetoj amuzis nin ĉiujn. Finis la feston komuna kaftrinkado kaj ĝuado de la tradicia zamenhofkuko!

Viktorio: Raportas Franciska Toubale

La Zamenhofa festo en Melburno:

Dum la jaro 2003, la skoltinoj vendis sian ejon, kio kreis problemon por la Viktoria Esperanto Federacio, kiu kutimis uzi la lokon por festi la naskiĝon de Zamenhof. La prezidanto, Bernie Heinze, turnis sin al la Melburna konsilio, kiu finfine konsentis konsideri ke nia asocio kontribuas al la multekultureco de nia urbo kaj pagis por ni la laborhorojn de deĵoranto kaj la lupagon de bela, granda ĉambro en la urbodomo de la nordo de Melburno.

La festo komenciĝis per komuna manĝo sur la teraso. Samtempe eblis cerbumi por solvi la enigmon, kiu troviĝis sur la supro de la kuko provizita de Betty Broadbent:



Ĉu vi komprenas?

Vizitanto el Japanujo, Ŝun (Chida Shuntaro), kiu jam loĝas en Melburno de pluraj monatoj kiel studento de lingvistiko, faris la festparoladon. Li montris ke kvankam prepozicioj ne multas en la japana aŭ en tok pisin, lingvo de Papuo Novgineo, eblas esprimi la samajn nociojn alimaniere. Sekvis kvin

teatraĵetoj: tri originale verkitaĵoj kaj du tradukoj el la angla. La temoj estis tre diversaj kaj la etoso alternis de komedia al tragedia aparte en *Rifuĝinto* verkita de Trevor Holton.

Kam Lee ne forgesis kunporti sian gitaron kaj regalis nin per famkonataj aŭstraliaj kantoj.

Pamela Fenton gajnis en la kvizo proponita de Trevor Holton pri naciaj kostumoj el la tuta mondo.

Pro manko da tempo, ni devis aŭdiaŭi unu la alian post nur unu ludo, kiu paroligis ĉiujn ĉeestantojn.

Mi tre ĝuis tiun feston ĉar regis gaja amika etoso kaj pro tio ke multaj homoj proponis eron por la programo.

Tamen por firmigi la valoron de nia asocio en multekultura konteksto necesas pripensi kiel fortigi la ligojn kun la diversaj ĝemeligitaj urboj de Melbourne. □

Esperanto-akvoputo en la lernejo J.V. en Benino

La esperantista lernejo Jules Verstraeten, en la fora benina vilaĝo Koĝi, fondiĝis en 1999 danke al la helpo de eŭropaj esperantistoj, precipe el Germanujo, Francujo, Belgujo kaj Danujo. Nun kvar jaroj jam pasis, kaj la infanoj kiuj komencis lerni je la nasko de la lernejo estos en la kvina lerneja jaro ekde oktobro 2004, ĉiam kun la samaj dediĉo kaj entuziasmo por Esperanto. La instruisto estas Pierre Houenavo. La tiam konstruita lernejo konsistas nur el tri klasoj. Pro tio jam urĝas disponigi kvaran klasĉambron por ke la lernejo iom post iom atingu la sesnivelan gradon kiel la benina eduksistemo rekomendas.

Sed malfeliĉe la kolektita sumo ne tute sufiĉas por pligrandigi la lernejon, kaj alia pli grava malfacilaĵo aldoniĝis. Multaj infanoj en la lernejo malsaniĝis pro manko de trinkebla akvo. Malsata infano certe ne multon povas lerni, eĉ en la plej bela lernejo. Ĉar urĝis solvi tiun problemon, grandan parton de la kolektita sumo ni uzis por fosigi puton ene de la lernejo. Danke al tiu puto la infanoj trinkas pli puran akvon kaj ankaŭ ĝi ebligas terkultivadon pere de akvumado, precipe dum la seka sezono. Tiam legomoj kaj fruktoj estos tre multekostaj, tiel la lernejo povos enspezigi sufiĉe da mono per la vendado de la varoj el la ĝardeno en la loka bazaro.

La tuta ĉisomera laborado: fosado de puto, pretigo de tereno por la konstruado de kvina klasĉambro el loka materialo, ktp. certe ne eblus sen sindediĉo kaj bonvolo de la infanoj.

Ekpuŝado de la infanoj al bredado, kultivado, ne nur estas aktivado kiu kreas profiton, sed ĝi estas ankaŭ projekto kiu celas instrui kiel sin vivteni per aferoj el sia propra medio.

Tial, ni ne donas al ili fiŝojn, sed ni instruas kiel fiŝkapti.

(Laŭ raporto de Jean Codjo, nun en Kanado: jean_codjo@yahoo.com, plusendita de Agnes Geelen agnes@esperanto.be, komisiito de UEA pri “lern-ejoj por evoluo”) [el: *Ret-info* <http://www.eventoj.hu>] □

Notes on Profit & Loss Statement

Overall expenses exceeded income by \$7,895.

Income

1. Subscriptions	Two new life members (\$1,000)	
2. Donations	Canberra Esp. Society closure	\$ 255
	Sydney Summer School refund	\$1,348

Expenditure

3. Libroservo Administrator (Vladka)	\$1,950	
4. <u>Projects:</u>		
'Informado':		
- Bumper stickers & Banner		\$1,040
- Advertising (Education Review)		\$ 330
- Language Exhibition		\$ 200
- Newspaper Notices		\$ 370
		<u>\$1,940</u>
'Instruado'		
- Treetops Montessori	\$ 455	(Note: Further \$ 228 in '03/'04)
- LOTE Teaching Aids	\$ 997	(Note: Hazel sold \$ 908 of materials at UK in next year accounts 03/04)

5. Summer School - Melbourne

A paid co-ordinator was not employed.

The overall costs of the Summer School to A.E.A. was \$9,207.

Costs were heavily sub-subsided:

AEA Accommodation	\$ 5,211
AEA Travel	\$ 7,054
EFV	\$ 473
MES	\$ 1,452
EFNSW	\$ 396
Monash ES	\$ 180
Total Support	<u>\$14,766</u>

AEA Membership

Financial Members	<u>2003</u>	<u>2002</u>	<u>Change</u>
Full Members	86	74	+ 12
Koncesio	54	46	+ 8
Family/Associate	18	12	+6
Honorary/Life	20	20	+2/-2
Organisations	14	14	
Overseas	<u>10</u>	<u>3</u>	<u>+7</u>
Totals	202	169	+33

Fonduso

Definite rules do not exist in relation spending 'Fonduso' funds.

In order to maintain the value of the original capital for each fund it is proposed that it be increased annually by the Consumer Price Index (CPI).

The balance of the interest earned will be available for expenditures on projects.

In the event of a special matter arising that meets the aims of a particular Trust (eg book publishing), the Estraro may choose to expend some or all of the capital in that Trust.

Registration of Association

Our Public Officer and only member in the ACT is Hugh Malcolm.

We may still need to move the registration of our association to Victoria if he wishes to stand down.

Bequests

The following bequests have been received and will appear in 2004 Accounts

Faye Koppel	\$52,707
Ralph Harry	\$25,000

To be discussion in 'General Business'

Auditor

The CPA firm 'Addisons' of Burwood Victoria were appointed this year.

The Auditor's report is attached and state that in their opinion the accounts are correct and in order.

From the information provided, he was unable to fully verify the accounts from the Libroservo.

Issues Arising

The Auditors now believe that we may need to be registered to tax and pay tax on investment interest.

Rules relating to Associations have been modified since our last confirmation of exemption was granted in 1991. The Members should vote on this matter

Stephen Pitney (AEA Treasurer 2002/2003)

Australian Esperanto Association Inc.
Profit & Loss YTD Comparison
July 2002 through June 2003

	<u>Jul '02-Jun 03</u>	<u>Jul '01-Jun 02</u>	<u>\$ Change</u>
Ordinary Income/Expense			
Income			
Members Subscriptions	6,133.15	4,593.50	1,539.65
Interest Received (Bank)	10,012.03	9,729.82	282.21
AMP Trust Revaluation	-56.03	-641.56	585.53
Corresp. Course Income	487.80	527.40	-39.60
ESK Magazine NZ Income	302.20	546.85	-242.65
Donations	1,623.40 ←	0.00	1,623.40
Libroservo Income	15,410.68	18,080.46	-2,669.78
Summer School Income	35,837.44	44,088.05	-8,250.61
Sundry Income (Exams...)	209.00	219.40	-10.40
Other	451.00	0.00	451.00
Total Income	70,412.67	77,143.92	-6,731.25
Expense			
Auditor's Remuneration	2,255.00	1,876.50	378.50
Bank Charges	91.40	138.61	-47.21
Computer Expenses	0.00	1,209.94	-1,209.94
Corresp. Course Expenses	405.70	327.70	78.00
Depreciation of Equipment	800.00	817.00	-17.00
Donation/Gifts	0.00	-2,874.20	-2,874.20
ESK Magazine Expenses	3,072.23	2,642.39	428.74
ESK Sinking Fund	750.00	300.00	450.00
General Expenses	317.28	1,426.76	-1,109.48
Insurances	320.57	407.81	-87.24
LIBROSERVO			
Administration	1,950.00	5,401.00	-3,451.00
Books/Magazines from UEA	17,361.45	13,083.22	4,278.23
General Expense	1,964.25	4,501.12	-2,536.87
Total LIBROSERVO	21,275.70	22,985.34	-1,709.64
Postage	256.25	329.20	-72.95
Printing & Stationery	143.18	562.90	-419.72
Promotion Office (Monash Uni)	0.00	2,000.00	-2,000.00
Projects;			
Instruado (Budget \$2k)	1,451.15	0.00	1,451.15
Informado (Budget \$4k)	1,940.76	119.00	1,821.76
Total Projects;	3,391.91	119.00	3,272.91
Summer School Costs			
Co-ordinator	0.00	5,000.00	-5,000.00
Accommodation, Hire, Printing	39,289.73	43,128.27	-3,848.54
Teachers, Travel & Expenses	5,938.84	4,433.35	1,505.19
Total Summer School Costs	45,228.57	52,571.62	-7,343.05
Uncategorised Expenses	0.00	0.00	0.00
Total Expense	78,307.79	90,590.07	-12,282.28
Net Ordinary Income	-7.895.12	-13,446.15	5,551.03
Other Income/Expense			
Other Income			
Book Stock Revaluation	0.00	17,550.00	-17,550.00
Canberra Library (Estimate)	0.00	10,000.00	-10,000.00
Total Other Income	0.00	27,550.00	-27,550.00
Net Other Income	0.00	27,550.00	-27,550.00
Net Income	-7.895.12	14,103.85	-21,998.97

08/01/04

Balance Sheet - 30 June 2003

As of June 30, 2003

	<u>Jun 30,03</u>	<u>Jun 30, 02</u>	<u>\$Change</u>
ASSETS			
Current Assets			
Current/Savings			
1. OPERATING ACCOUNT			
CBA Cheque Account 0090 3636	5,618.57	1,749.22	3,869.35
CBS Term 5504 3872 (20/7/2003)	8,159.88	16,147.21	-7,987.33
1. OPERATING ACCOUNT - Other	0.00	-255.50	255.50
Total 1. OPERATING ACCOUNT	<u>13,778.45</u>	<u>17,670.93</u>	<u>-3,892.38</u>
2. CAPITAL ACCOUNT (Fonduso)			
Cheque Account 946975	10,149.64	9,880.10	269.54
AMP Blue Chip	12,759.52	13,484.47	-724.25
AMP Multimanager	6,637.98	6,885.75	-247.77
AMP Property Security	8,538.64	7,621.95	916.69
Term 5022 4058 (Exp. 9/12/2007)	20,213.75	20,213.75	0.00
Term 5028 3226 (Exp. 11/1/2004)	15,000	15,000	0.00
Term 5030 5026 (Exp. 9/8/2005)	10,000	10,000	0.00
Bond 946975 (Exp. 31/3/2005)	18,000	18,000	0.00
Bond 9801 0388 (Exp. 15/4/2004)	26,000	26,000	0.00
Bond 9502 2742 (Exp. 15/7/2005)	14,000	14,000	0.00
Bond 9400 7968 (Exp. 15/4/2008)	10,000	10,000	0.00
Total 2. CAPITAL ACCOUNT (Fonduso)	<u>151,299.53</u>	<u>151,086.02</u>	<u>213.51</u>
3. BOOK SERVICE (Libroservo)			
Challenge Bank *WA) 204-593	5,998.67	0.00	5,998.67
NAB Cheque Account NSW 932-2985	7,927.64	11,003.47	-3,075.83
UEA Account (Netherlands)	3,862.77	9,715.26	-5,842.49
Total 3. BOOK SERVICE (Libroservo)	<u>17,789.08</u>	<u>20,718.73</u>	<u>-2,929.65</u>
4. CORRESPONDENCE COURSE			
CBA Savings 500 4332 (Closed)	0.00	923.36	-923.36
CBA Term 5003 6074 (Exp. 2/8/02)	6,500.00	6,500.00	0.00
Cheque Account 4710 918 439	2,736.02	1,793.43	942.59
Total 4. CORRESPONDENCE COURSE	<u>9,236.02</u>	<u>9,216.79</u>	<u>19.73</u>
5. SUMMER SCHOOLS			
SUMMER SCHOOL - ADELAIDE	5,224.53	5,088.85	135.68
SUMMER SCHOOL - MELB. (Closed)	0.00	181.31	-181.31
Total 5. SUMMER SCHOOLS	<u>5,224.53</u>	<u>5,270.16</u>	<u>-45.63</u>
6. INTERNATIONAL TRAVEL FUND			
Term 5013 8423 (Exp. 39/12/03)	15,502.97	14,815.74	687.23
Term 5014 3134 (Exp. 6/9/2003)	16,120.45	15,410.56	709.89
Total 6. INTERNATIONAL TRAVEL FUND	<u>31,623.42</u>	<u>30,226.30</u>	<u>-5,237.90</u>
Total Current Savings	228,951.03	234,188.93	-5,237.90
Other Current Assets			
INVENTORY			
Stock - 3. Book Service	30,000.00	32,770.75	-2,770.75
Stock - 4. Correspondence Course	2,435.06	2,226.73	168.33
Canberra Library (Approx. \$)	10,000	10,000	0.00
Total INVENTORY	<u>42,435.06</u>	<u>45,037.48</u>	<u>-2,602.42</u>
Total Other Current Assets	<u>42,435.06</u>	<u>45,037.48</u>	<u>-2,602.42</u>
Total Current Assets	271,386.09	279,226.41	-7,840.32
Fixed Assets			
PROPERTY & EQUIPMENT	3,906.68	4,351.98	-445.30
Total Fixed Assets	3,906.68	4,351.98	-445.30
TOTAL ASSETS	275,292.77	283,578.39	-8,285.62

Australian Esperanto Association Inc.
Balance Sheet - 30 June 2003

As of June 30, 2003

	June 30, 03	June 30, 02	\$ Change
LIABILITIES & EQUITY			
Liabilities			
Current Liabilities			
Other Current Liabilities			
Africa Fund	0.00	165.00	-165.00
Ilei Deposit	69.71	295.21	-225.50
Total Other Current Liabilities	69.71	460.21	-390.50
Total Liabilities	69.71	460.21	-390.50
Equity			
Opening Bal Equity	256,522.90	256,522.90	0.00
Retained Income	26,595.28	12,491.43	14,103.85
Net Income	-7,895.12	14,103.85	-21,998.97
Total Equity	275,223.06	283,118.18	-7,895.12
TOTAL LIABILITIES & EQUITY	275,292.77	283,578.39	-8,285.62



Chartered Accountant
 Business Advisors
 Tax, GST & MYOB Specialists
 Productivity Solutions

12 Wesley Court, Burwood East 3151
 Ph: (03) 9945 7000 Fax: (03) 9945 70
 www.addisons.com.au
 Email: info@addisons.com.au

8 December 2003

To The Members
 Australian Esperanto Association Inc
 C/- Mr S Pitney
 57 Denham Street
 Hawthorn VIC 3122

DEAR MEMBERS

AUDITORS CERTIFICATE

SCOPE

I have audited the financial statements of the Australian Esperanto Association Inc for the year ended 30 June 2003 as set out on the pages attached.

The association and its treasurer are responsible for the financial statements. We have conducted an independent audit of those financial statements in order to express an opinion on them to the members of the association.

Our procedures included examination on a test basis of evidence supporting the amounts and other disclosures in the financial statements. These procedures have been undertaken to form an opinion whether in all material respects the financial statements have been presented fairly in order to provide members with an accurate reflection of the years trading and financial position.

The audit opinion has been formed on the above basis.

AUDITORS OPINION

My opinion is that the financial statements of the Australian Esperanto Association Inc are properly drawn up so as to give a true & fair view of the association's state of affairs as of 30 June 2003 and its receipts, expenditure and cash flows for the financial year ended on that date.

Steven Wildes
 Addisons Chartered Accountant
 8 December 2003

La Aŭstralia Esperanto-Asocio

<http://www.esperanto.org.au>

Prezidanto: *Matthew Maguire*, 9 Nioka Rd, Narrabeen NSW 2101

Vicprezidantoj:

Sandor Horvath, 31 Addison Rd, Black Forest, SA 5035. (08) 8297 6249
sandor.horvath@unisa.edu.au

Jennifer Bishop, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122. esperanto@education.monash.edu.au

Sekretario: *John Gallagher*, 81 Lalla Rd, Lillydale Tas 7268. abcetc@ozemail.com

Helpsekretario: *Henry Broadbent*, 63 Kennedy Rd, Somers Vic 3927. (03) 5983 2731. henryb@peninsula.hotkey.net.au

Kasisto: *Stephen Pitney*, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122. pitney@goldenit.net.au

Helpkasisto: *Ken Rolls*, 31 Miller Crescent, Mount Waverley Vic 3149. kenjohnrolls@yahoo.com.au

Kotizoj: \$Aŭ30 por individuo aŭ klubo (+\$5 for familiano[j] ĉe la sama adreso; \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto.

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

<http://www.esperanto.org.nz>

PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035

Prezidanto: *Bradley McDonald*, ĉe la asocia adreso. bradley.m@xtra.co.nz

Sekretario: *Howard Gravatt*, ĉe la asocia adreso. hgravatt@ihug.co.nz

Kasisto: *Jackie Fox*, ĉe la asocia adreso.

Kotizoj: \$NZ40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (<20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto.

Esperanto sub la Suda Kruco

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio. ☎ (08) 9641 1937, 📠 (08) 9641 1134.
sudakruco@sudakruco.org.

Membroj de AEA kaj NZEA aŭtomate ricevas *ESK* on. Prezo de pliaj ekzempleroj de *ESK*: por membroj, po \$Aŭ3.00+poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25+poŝtsendkosto. Menu de la Libroservo de Aŭstralia Esperanto-Asocio.

Abonoj ekster Aŭstralio kaj Nov-Zelando kostas €23,70. Pagu al la konto *ael-w* ĉe UEA, de la Libroservo de Aŭstralia Esperanto Asocio.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas ©2004 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu gazeto estas ©2004 de la Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas menciita.

Ĉi tiu numero de *ESK* estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb, per iMac. La programo uzita estas Mellel. La tiparoj uzitaj estas New Century Schoolbook kaj Helvetica.

Specialaj kunlaborantoj:

Odlo Bokserp, I.N.K., K.R.A.J.O.N., K.R.E.T.

Prezidanto de la Internacia Asocio de Presmisistoj

Nobla premiito en la fako Fuŝado

Vera Doloro, L.M.K., D.H.A.M.N.

(Lia Multsuferanta Kontrolisto, Dumviva Honora Agoklagotago-Membro Nepra)

Wholly Printed in Australia.

Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA, Australia.

Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic 3168, Australia

If undeliverable return reply to
D. Broadribb
PO Box 643
York WA 6302
Australia

Esperanto sub la Suda Kruco
Vol. 12, No.2, Marto-Aprilo 2004

Print Post Approved
PP631048/00005

**SURFACE
MAIL**

**POSTAGE
PAID
AUSTRALIA**